

Hermann Schmidt,
Sopirplena tago

tradukita de Manfredo Ratislavo

Finiĝas tago,
sopiras mi.
Mi estas trista
pro tio ĉi.

Ĉu rajtos ree
ekvivi mi?
Grizega estas
ja ĉio ĉi.

Vundita estas
nun mia kor'!
Turmentas ege
min la dolor'.

Sed Dio stiras
tra ĉio min,
la vivon gvidas
al bona fin'.

*Traduko de la Frisa poemo "En Dai fol Lêngen" de HERMANN SCHMIDT (*1901-11-10 – †1979-03-10) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1994.*

MR-264-1a / Arg-65-128 (2003-10-26 01:36:35)